# AVENO #52 - **Homaj Rajtoj kaj Respondecoj – 2026**

Ĝenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serĉas ion ĉi-sube: pli frue mi uzis la literumadon pere de „x aŭ h“: ch, … sh + u. Ligoj, sed ekde 2023 ĉefe la ĉapelitajn literojn.

Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE): www.verduloj.org , novaj artikoloj je la enirpaĝo, aliaj sub "Dokumentoj“

Homaj Rajtoj (1947): eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Rajtoj

L-ingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

Homaj Respondecoj (1997):
eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Respondecoj

la dokumento en la angla, kiu ligas al tradukoj en ch. 40 lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

Internaciaj Tagoj:

27a de Januaro: Holokaŭsta Tago

3a de Majo Monda Tago de Gazetara Liberecos
26a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto
21a de Septembro Tago de Paco
esperantoporun.org/wp-content/uploads/2025/08/Esperanto-Paca-Tago-2025.pdf
26a de Septembro: Int. Tago de kompleta Abolicio de Atomarmiloj
UN decidis tion je la 17a de Oktobro 2025
= = = = =

= =
2026-06 Turkaj popoloj distanciĝas de Rusio
Rakonto pri la evoluo de la popoloj okupitaj de Rusio dum jarcentoj:
Multe pli da turkdevenaj soldatoj ol rusio-etnaj mortis dum la milito kontraŭ Ukrainio.
Re-ŝanĝas la skribmanieron al latinidaj literoj, same kiel en Turkio.
Interesaj informoj kaj hipotezoj.
Sen fotoj, germana lingvo kun subteksto, klara parolado, 27 min.
> youtube.com/watch?v=QCpKE_mn_cE
\- - -

2026-06 Krimeo perdas sian valoron por Putin
Pli kaj pli da batetoj kontraŭ militara infrastrukturo, kaj transport-vojoj.
> youtube.com/watch?v=I_bwRGfed-4

- - -

2026-06-15  Atencoj organizitaj (rekte/malrekte) de Putin kontraŭ disidentoj kaj karikaturisto(j)

Jen la plej konataj ekzemploj el la lastaj 20 jaroj:

2006-10-07*  Anna Politkowskaja mortpafita, je la naskiĝtago de Putin, antaŭ ŝia loĝejo.

2009   Natalja Estemirowa, amikino kaj kolegino (Nowaja Gazeta) de Anna.

2015-02-27  Boris Nemzow, li publikigis la koruptecon de Putin, mortigita sur la Moskwa-Ponto, proksime de la Kremlo.

20218-03-04  Sergej Skripal kaj lia filino Julia estis venenigitaj en Salisbury, proksime de Londono – dank' al bonaj kuracistoj ili ne mortis.

2024-02-16  Alexej Nawalnj, en Gulago Charp IK-3 –2020  li estis venenigita la unuan fojon, kaj nun la duan fojon.

2024-03-12  Leonid Wolkow, kunlaboranto de Nawalny, estis ataktia per martelo antaŭ sia domo.

Krome,

2024 usona sekreta servo malhelpis atencon kontraŭ Armin Papperger, CEO de Rheinmetall en Germanio, kiu produktas tankojn kaj obusojn ankaŭ por subteni Ukrainion.

2026-06-15  Semyon Skrepetsky, rusa karikaturisto kiu vivis ekde 2021 en Pollando, estis mortpafita (15a de Junio). La malliberigitaj murdistoj laboris laŭ ordono de Putin aŭ de Ramsan Kadyrov.

Emilie Aubry montras en tiu konciza doku la portretojn de tiuj personoj, kaj informas pri detaloj, kaj montras la lokojn sur la mapo. En la franca kaj germana, 4 minutoj.

>  arte.tv/de/videos/126925-095-A/mit-offenen-karten-im-fokus/

Pliaj dokumentoj:

>  fr.wikipedia.org/wiki/Assassinat_politique

Komento AVE/mw: tiuj estis nur ekzemploj. Bedaŭrinde tia mafieca metodo estas uzata de pluraj regantoj: Trump (Usono), Netanjahu (Israelo), ktp.

En aliaj lando oni uzas mortpunon, ofte pro politikaj kialoj.

= =

2026-06-03  Torturo kaj Sadismo en Rusaj Malliberejoj

Soldatoj revenantaj el kaptiteco ofte mortas monatojn poste. Ili estis brutale batitaj, torturitaj, kaj ofte suferas pro mensmalsano.

Ankaŭ civilulo – vivinte sur Krimeo - rakontas, ke li konfesis la akuzojn (ke li spionis) kontraŭ li, ĉar alie liaj gepatroj ankaŭ estus akuzitaj. Ekzistas pruvoj pri almenaŭ 1000 malliberuloj en du rusaj malliberejoj estantaj torturitaj. Ili estas mistraktataj malobservante internaciajn regulojn pri kaptitoj kaj militkaptitoj.

-- La sama video inkluzivas ankaŭ raporton (parto de la YouTube-kanalo de Novaja Gazeta) pri kelkaj rusaj militkaptitoj kiuj estis liberigitaj. Ili ne raportas pri torturo en ukrainiaj malliberejoj, kelkaj eĉ ne komprenas kial okazas ĉi-tiu milito.

Video, 52 minutoj, en la franca kaj germana lingvoj, ankaŭ kun subtekstoj - havebla nur ĝis

la 7-a de junio:

> arte.tv (demandu: > Ukrainio > Revenante el Rusa Kaptiteco), aŭ rekte:

> arte.tv/de/videos/124239-057-A/arte-reportage/

ankaŭ interesa pri la celo de Putin – atingi Transnistrio:

> novayagazeta.eu/en/articles/2025/09/09/potemkin-2-0-en

= =

2026-05-29 Detruo de Homaj Rajtoj en Irano

Jen informo pri malliberigitaj bahaanoj en Irano, kaj ligilo al la informo de Hannah Neumann, parlamentano el Berlino (Alianco 90/La Verduloj), kiu ankaŭ dokumentas la parlamentan matenmanĝon en la Bundestag pri ĉi tiu temo.

**Yeganeh Agahi & Yeganeh Rouhbakhsh:** 2 el 10 bahaaj virinoj, kiuj estis kondamnitaj de irana apelacio-kortumo al 10-jara malliberejo.

Jen poemo de Yeganeh, juna bahaanino – prezentita de pluraj internaciaj virinoj, germane:

> instagram.com/reel/DYfJeFfsqq4/

Pli pri Hannah Neumann kaj Irano:

> hannahneumann.eu/an-der-seite-der-menschen-in-iran-fuer-freiheit-wuerde-und-gerechtigkeit/

- - -

2026-05-25 M23 en Ruando kaj DR Kongo

pluraj per-Esperanto-Agadoj de AVE troviĝas en DR Kongo (Goma, Bukavu, Kalima) kaj Burundo.

Ĉar Burundo (ankoraŭ) ne havas interesajn mineralojn, ĝi ne estas trafita de la nuna milito inter Ruando kaj DR Kongo. Pri tiu milito Arte produktis dokumentan videon, kiu klarigas la diversajn rilatojn. Ĉ. 8 min, en la franca aŭ germana lingvoj:

> arte.tv/de/videos/125533-025-A/mit-offenen-karten

Komento de AVE/mw: nuntempe denove Ebola kaŭzis epidemion en tiu regiono. La milita situacio malfaciligas la traktadon kaj redukton de la epidemio.

= =

2026-05-20 Israelo pli-kaj-pli distranĉas Palestenon,

malebligas pozitivan evoluon tie. Aktuale Israelo detruas konstruaĵojn de palestenanoj en regiono oriente de Jerusalemo, kiu estas kontrolita de Israelo, sed apartenus al la palestena Okcidenta-Bordo. Tie ili volas etendi la judajn setlejojn. La tre grava temo estas, ke post tiu projekto E1 de 3.400 da novaj loĝejoj la palestena teritorio estos distranĉita.

En konsila opinio publikigita la 19-an de julio 2024, la Internacia Kortumo (IK) klasifikis la setladan politikon de Israelo en la okupitaj palestenaj teritorioj kiel malobservon de internacia juro: "La translokigo de setlantoj al Cisjordanio kaj Jerusalemo kaj la konservado de ilia ĉeesto fare de Israelo malobservas Artikolon 49 de la Kvara Konvencio de Ĝenevo," Palestenanoj estas submetitaj al sistema diskriminacio. La kortumo postulis la pagon de reparacioj kaj la redonon de la tereno okupita de Israelo ekde 1967.

germane: > tagesschau.de/tagesthemen/video-1586830.html

Vidu ankaŭ en la esperantlingva vikipedio.

- - -

2026-03-25 La dekstra populista registaro en Slovakio atakas la jurŝtaton jam de monatoj.

Ĉefministro Fico sisteme malfortigas la aŭtoritatojn kiuj devus kontraŭbatali korupton. La Eŭropa Parlamento alvokas la Komisionon protekti la jurŝtaton en Slovakio kontraŭ pliaj atakoj. Por la unua fojo, la Eŭropa Parlamento postulas, ke proceduroj estu komencitaj kontraŭ Bratislavo por protekti la EU-buĝeton. Kadre de la senŝarĝiga procezo, la Parlamento revizias la ĝustan utiligon de EU-fondusoj fare de la Komisiono. La misuzo de EU-fondusoj en Slovakio nun estas realo. Subvencioj celitaj, ekzemple, por antaŭenigi turismon en kamparaj regionoj, anstataŭe estis uzitaj por financi luksajn vilaojn por homoj proksimaj al Fico. Anstataŭ limigi ĉi tiujn praktikojn, Fico malfondis la koncernan prokurorejon kaj malmuntis la respondecan enketan instancon. Li volas forigi protektojn de interninformantoj kaj ŝanĝis la leĝojn por permesi al kondamnitaj koruptaj krimuloj esti liberigitaj el malliberejo.

> danielfreund.eu/aktuelles/fico-zerlegt-den-rechtsstaat-kommission-muss-gelder-einfrieren/

2026-05-25 aktuale pri Slovakio

La EU-parlamento postulis hodiaŭ

La Eŭropa Parlamento hodiaŭ voĉdonis per granda plimulto ripetante sian postulon, ke la Komisiono komencu procedurojn kontraŭ Slovakio por protekti EU-financojn. Jen Daniel Freund (Verda Partio), raportanto por la malŝarĝo de la Komisiono:

> danielfreund.eu/aktuelles/slowakei-baut-rechtsstaat-ab-ueber-1300-korrupte-kriminelle-freigelassen/

= =

2026-05-10 Milito de Putin kontraŭ Ukrainio – kiom longe ankoraŭ

Hieraŭ ni aŭdis ke Putin invitas al interparolo kun Selenskij – kiel mediacianto li proponis la germanan eks-kancelieron Schröder – amiko de Putin, malgraŭ de tio ke Schröder klare diris ke tiu milito estas kontraŭ la Leĝo de la Internacia Popolaro.*

La alternativa grupo Dekoder.org publikas regule pri Rusio kaj Belarus ( en la rusa, belarusa kaj germana lingvoj). Jen argumentoj kial estas malfacile por Putin simple fini la militon - en longa listo da tiaj argumentoj – laŭ la alfabeto:

> dekoder.org/de/article/abc-wissen-russland-krieg/

kaj la mito: ke Ukrainio ĉiam apartenas/is al Rusio – en la angla:

> specials.dekoder.org/en/russias-history-myths-unmasked/crimea/

*) mi delonge preĝas ke okazu la miraklo, ke Putin mem rekonas ke lia milito estis eraro. Eble – kiam marŝis miloj da liaj soldatoj sur la Ruĝa Placo en Moskvo – eble lia konscienco rimarkis ke jam 300.000 da ili estis mortaj, kaj supozeble pli ol tio estas viv-longaj invalidoj. Iu rusa virino rakontis al mi ke pli kaj pli ofte oni vidas tiajn invalidojn en la urboj de Rusio.

\- - -

2026-05 Libroj pri Putin-a milito

aktuale aperas pluraj libroj pri la (fonoj de la) milito de Putin kontraŭ Ukrainio:

jen en la germana

Victor Jerofejew, „Die neue Barbarei“ im Untertitel: „Romanfantasie über die russische Schuld“

- -

(ankaŭ en la angla) Anne Applebaum "Der Eiserne Vorhang – Die Unterdrückung Osteuropas 1944 – 1956", do plejparte pri la tempo de Stalin, 533 p. (dense printitaj + longa listo la font-indikoj.

Giganta dokumenta verko kiu montras en 18 ĉapitroj kiel estiĝis kaj kiel agis tiu totalisma reĝimo.

Putin ja diris je la komenco de tiu milito, ke la disfalo de Sovet-Unio estis la plej granda katastrofo de la 20a jarcento. Kaj tio signifas ke li volas restarigi ĝin laŭeble.

Li estas blinda KGB-ano, kiu ne rimarkis ke tiu sistemo ne povis funkcii, ĉar la bazo de SU estis mensogoj, teroro, faŝismo kaj la rusa etno-naciismo.

= =

## 2026-04-23  Peticio kontraŭ grundminoj, ke ili ne estu reportitaj al Eŭropo.

“Ni povas provizi per minoj ajnan limon ene de 48 horoj.”

Tion diris la pola registaro. Temas pri armilo, kiun la mondo malpermesis antaŭ jardekoj. Armilo, kiu kostis al ni milojn da vivoj. Temas pri grund-minoj, kiuj estos reportitaj al Eŭropo.

Pollando prepariĝas por grandskala produktado. Finnlando jam planas trejni soldatojn pri ilia uzo. Kaj en Germanio, politikaj voĉoj postulas la kompletan ĉesigon de la malpermeso de teraj minoj.

Grund-minoj restas aktivaj dum jardekoj, entombigitaj en la grundo - kaj daŭre mortigas homojn longe post la fino de konfliktoj. Pluvivantoj alfrontas amputojn, permanentajn handikapojn kaj traŭmatojn. Iliaj viktimoj inkluzivas infanojn survoje al lernejo, familiojn vojaĝantajn per aŭto kaj farmistojn laborantajn kun traktoroj.

Tamen la malpermeso restas valida. Landoj kiel Germanio kaj Svedio ankoraŭ ne faris decidon. La Eŭropa Unio povas konstante defendi la malpermeson.

jen la raporto - en la angla:

>  the-monitor.org/reports/landmine-monitor

Tiel oni evitas estontajn katastrofojn: kiam homoj kiel vi kaj mi protestas frue - antaŭ ol decidoj estas faritaj kaj antaŭ ol grandskala produktado komenciĝas. Agu antaŭ ol estas tro malfrue:

Tiu retejo por partopreni la proteston estas legebla en la jenaj lingvoj:

de, en, es, fr, it, nl, pl

>  action.wemove.eu/sign/2026-04-ban-landmines-europe-petition-DE/

= =

## 2026-03-14  Irano – ĉu politika ŝanĝo eblas ?

Bedaŭrinde UN ne sukcesas realigi la garantion pri Homaj Rajtoj. Tiuj delonge estas malagnoskitaj en Irano (ekz-e). Ankaŭ la Sekureca Konsilio ja estas tro ofte blokita de iuj vetoantoj. Krom tio, la politiko de la nuna Irano celas neniigi Israelon.

Certe necesas kritiki ankaŭ Israelon, kies Apartheid-reĝimo kontraŭ palestenanoj gvidas al malpaco kaj interetna malamo, aparte en tiuj jam reduktitaj regionoj kiuj apartenus al ili.

Irano kreis militaran reton ĉirkaŭ Israelo (Hisbollah, Hamas, Huthi, Haŝd aŝ-ŝabi, en Irako).

La civitanaj manifestacioj en Irano estis subpremitaj perforte, multaj homoj mortigitaj kaj malliberigitaj). La ekonomio estas kontrolita de la religia oligarĥio.

Aldonendas atencoj de Al-Kuds en eksterlando kontraŭ judaj kunvenoj, ekz-e 1994 en Buenos-Aires kontraŭ AMIA, organizita i.a. de Ahmadi Vahidi.

Estas pluraj temoj kiuj justigas batalon (ne-konforme al la UN-Ĉarto) kontraŭ ĉi-tiu sistemo.

(laŭ A. Fanizadeh, taz.de, 2026-03-14/20, p.41)

Filmo pri la situacio de virinoj en Irano, produktita 2022:
https://www.arte.tv/de/videos/113185-000-A/frau-leben-freiheit-eine-iranische-revolution/

Komento de AVE/mw: la civitanoj, aparte la virinoj, esperas pli bonan situacion.
- - -
2024  Dokumenta filmo pri atom-centraloj de Ukrainio, sub milita kondiĉo

1986-04-26  eksplodo de Ĉernobil

1994-12  Memorandum de Budapesto – Ukrainio transdonas la restintajn atomarmilojn al Rusio, Rusio garantias la suverenecon de Ukrainio en la limoj kiuj heredis la lando post la disfalo de SU.

Malgraŭ tio, Putin kaj Medvedev tamen post 2022 minace parolas pri uzo de atomarmiloj, se iu malhelpas la okupadon de Ukrainio.

2022-03 Rusio okupas la ruinon de Ĉernobil, kaj poste la AEC Saporiŝija ( 6 blokoj).

2022-09-12 ĝis 10-27  plurfoje torturo kaj malliberigo de kelkaj respondeculoj.

2023    Detruo de la baraĵo de Kaĥovka kiu garantias malvarman akvon por la AEC. Sekve povas okazi problemo de malvarmigo de la uzitaj brul-bastonoj. Feliĉe restas sufiĉe alta nivelo.

Minaco restas.

Video 52 minutoj, subtitolita en pluraj lingvoj.

https://www.arte.tv/de/videos/114591-000-A/inside-saporischschja-ein-atomkraftwerk-im-krieg/
- - - -
2026-02-24   Konkeri, subigi, rusigi – la kolonia strategio de Rusio

La milito de Rusio kontraŭ Ukrainio – kiu komencis antaŭ 4 jaroj fru-matene je 2022-02-24 - ne nur okazas sur la batalkampo, sed ankaŭ estas batalo por la historia memoro. La Kremlo uzas elpensitajn rakontojn por prezenti Ukrainion kiel artefaritan ŝtaton kaj por kaŝi sian propran koloniisman pasintecon. Tiel la Kremlo kreas specon de falsa historio, kiu servas por legitimigi perforton kontraŭ ukrainoj kaj forviŝi la ukrainan identecon.

Maksym Eristavi, aŭtoro de "Rusa Koloniismo 101", prezentas la programon kaj montras, kiel Rusio dum generacioj provis kontraŭbatali la ukrainan identecon. Inkluĝive de Holodomor – malsat-mortigo de ĉ. 4 milionoj da ukrainanoj; kaj pli poste deportado de intelektuloj al Siberio aŭ Centra Azio, dum kio mortis duono de tiuj homoj.

Esplora raporto de la reta portalo Kyiv Independent malkaŝis, kiel junuloj el okupitaj teritorioj estas milite trejnitaj en rusaj tendaroj – kun la celo poste uzi ilin kontraŭ sia propra lando.

Arto/historiistino Oksana Semenik batalas sur la internacia scenejo kontraŭ jardekoj da alproprigo de ukraina arto kaj certigas, ke muzeoj tutmonde reetikedigas siajn kolektojn.

Krimea tataro Elvis Çolpuh rakontas, kiel lia familio kaj dekoj da miloj da aliaj estis deportitaj el Krimeo en 1944 kaj kiel Rusio ekde 2014 rusigas Krimeon per miliono da rusaj setlantoj, subigas la tatarojn kiuj remigris post la Stalina deportacio. Rusaj miliculoj (soldatoj sen rus-naciaj emblemoj), t.n. "Verdaj Hometoj" en la okcidento aŭ "Afablaj Homoj" en Rusio deportis milojn da ukrainiaj artaĵoj post la neleĝa anekso de Krimeo al R.F. . La celo estas plene forviŝi ukrainan senton, kulturon kaj lingvon.

Tracks East montras, kiel Ukrainio batalas por la vero, por sia memoro kaj por sia

estonteco; kaj aliflanke la imperiisman politikon de Putina Rusio subigis Krimeon, kaj celas rusigi Ukrainion entute.

Plejparte tradukita pere de DeepL.com (free version) – videbla ĝis 2030-01-12.

La filmo daŭras 30 minutojn, estas aŭskultebla en la franca kaj germana, kaj subtitolita en la angla kaj polas lingvoj.

https://www.arte.tv/de/videos/129417-002-A/tracks-east/

- - -

2026-01-25   Neni-ulo kontraŭ Putin

Homo el malgranda urbo en Uralo kiu fuĝis el Rusio 2024. Dokumento de la militarizigo de lernejoj, de la tuta socio. Videbla dum longa tempo en la franca kaj germana lingvoj, kelkfoje ruslingvaj paroloj.

https://www.arte.tv/de/videos/116712-000-A/ein-nobody-gegen-putin/

- - -

2026-01-11  Grenlando – Kalaallit Nunaat (Lando de gronlandanoj)

Diskuta raport-video pri la rolo de Grenlando inter Usono kaj Ruslando.

Resursa ekonomio, naturo, klimato kaj kulturo – geopolitikaj demandoj pri la estonteco de Grenlando.

https://www.arte.tv/de/videos/126180-000-A/groenland-der-neue-rohstoffrausch/

La ĵurnalo "La Norda Lumo" 1964 eldonis apartan numeron pri Grenlando – eble dum la 90aj jaroj.

= =

Ankoraux dum 5 tagoj videbla.

2026-01-07  **Irina Scherbakova – rusia konscienco malafabla por nuna Rusio**

Irina Scherbakova rakontas pri sia juneco kaj cxefe pri la kreado de Memorial, kiuj notis spurojn de stalinismaj krimoj,

poste ankaux pri la militkrimoj de la soveta (kaj poste la rusa) armeo en Afganio kaj Cxecxenio.

2021-12-28 La plej supra jugxejo en Moskvo ordonas la finon de Memorial International,

2022-02-28 okazis malpermeso de la laboro en Rusio - tiam okazis trasercxado de la oficejo en Moskvo, kaj la fina malpermeso labori en Rusio.

Je la 10a de Decembro 2022 Memorial estis honorita per la Nobel-Premio pri Paco.

Memorial kondamnis la militon de Putin kontraux Ukrainio.

Tiam sxi forlasis Rusion; unue al Israelo.

Ek de 1999 sxi kunlaboras kun Weimar, kie sxi interesigxas pri la nazia gulago "KZ Buchenwald", kaj krome tie pri la sovetia special-gulago kaj aktivis por ricevi dokumentojn el sekretaj dokumentejoj en Rusio.

Sxi prelegas en tuta Euxropo, i.a. pri "Agresa milito de Putin kaj la civila socio en Rusio - Kiamaniere jxurnalistoj kaj kultur-kreantoj dauxrigas luktas por Alia Rusio.

Intertempe sxi logxas en Berlino. Nun ili fondis la NRO Memorial Zukunft – por tuta Europo.

>zukunft-memorial.org/

Ankoraux dum 5 tagoj videbla. Video-raporto 2023, 52 min, en la germana, subtitolita en la franca kaj pola lingvoj

>arte.tv/de/videos/113608-000-A/irina-scherbakowa-russlands-unbequemes-gewissen/

Informo en Esperanto:

>eo.wikipedia.org/wiki/Irina_%C5%9C%C4%89erbakova